

## Cultuur en taal

Marcel Leereveld

De taal vertegenwoordigt de begrippen, die ons verstand vormt van de buitenwereld (met inbegrip van ons eigen lichaam), en van de gedachten, die ons eigen verstand in zich zelf schept. De begrippen scheppen de taal, geschikt om de inhoud van die begrippen scherper te omlijnen en om ze van elkaar te onderscheiden, en om ze mee te delen. Bij het scheppen van de taal zijn er twee tegenstrijdige invloeden in het spel: de ene tracht de betekenis van een woord te begrenzen, en haar daardoor te beperken tot een nauwer begrip, terwijl de andere tracht de betekenis van een woord uit te breiden, zodat die betekenis een grotere hoeveelheid van ongeveer gelijke begrippen vertegenwoordigt. Deze twee invloeden treden geregeld op en maken de taal tot een geregeld veranderende vertegenwoordiger van ruimere en nauwere begrippen. Het voornaamste gevolg van deze regelde verandering is, dat tijdens het gebruik van een taal onder mensen de begrippen bij ieder individu nooit precies dezelfde zijn.

Ten gevolge hiervan is elke betekenis voor iedere spreker slechts een persoonlijke betekenis. De omstandigheden beslissen geregeld, of er een ruime betekenis voor een woord nodig is of een nauwe betekenis, of iets daartussen. Deze vaagheid van de begrippen die bij verschillende gebruikers van een taal achter de vage betekenissen staan, veroorzaakt enerzijds misverstanden, maar helpt anderzijds een vluggere uitwisseling van gedachten. In een taal is niets 100% zeker, dus is het maar een benadering. Hoe meer verschillend de culturen zijn des te meer mogelijkheden tot misverstand er zijn.

De uitgebreidheid van de menselijke cultuur in het algemeen hangt af van de uitgebreidheid van alle verschillende culturen tezamen. Het is daarom noodzakelijk om de grootste verscheidenheid van culturen en van begrippen te scheppen en te behouden. Dat is echter in strijd met het vermijden van misverstanden tussen de culturen, dus tussen de begrippen en de betekenissen van woorden. Hoe kunnen wij dit probleem oplossen, dat groter wordt door de globalisering, de uitbreiding van de internationale en interculturele betrekkingen? Weliswaar vertegenwoordigt een taaluiting soms een speciale cultuur, en is het schijnbaar niet mogelijk om precies uit één taal in een andere te vertalen. We moeten het idee echter niet overdrijven, dat een taalkundige vertaling niet bevredigend zou kunnen zijn, en dat we daarom met onze taal onze speciale begrippen niet te verstaan zouden kunnen geven aan iemand die een andere taal spreekt.

## Kulturo kaj lingvo

Marcel LEEREVELD

La lingvo reprezentas la nociojn, kiujn nia menso havas pri la ekstera mondo, inkluzive de nia propra korpo, kaj pri la pensoj, kiujn nia propra menso verkas en si mem. Samtempe la nocioj kreas la lingvon bezonatan por precizigi la enhavon de tiuj nocioj kaj por distingi ilin unu for de la alia. En tiu ĉi procedo agas du kontraŭaj tendencoj: unu inklinas limigi la signifon de lingvaĵo, tiel malvastigante ĝin al limigita nocio, kaj la alia inklinas plivastigi la signifon, tiel ke tiu signifo reprezentu pli grandan kvanton da intersimilaj nocioj. Ĉi tiu procedo funkcias daŭre kaj faras lingvon daŭre ŝanĝiĝanta reprezentanto de vastaj kaj malvastaj nocioj. La ŝanĝiĝadon pleje kaŭzas, ke dum la uzado de lingvo inter homoj la nocioj neniam estas precize la samaj ĉe la diversaj homoj.

Rezulte de tio ĉiu signifo estas por ĉiu lingvouzanto nur fluida signifo, nur alproksimiĝo al komuna signifo. La cirkonstancoj decidadas, ĉu ni bezonas ĝeneralan signifon por lingvaĵo aŭ pli malvastan signifon, aŭ ion inter tiuj. Tiu neprecizeco de la nocioj malantaŭ la neprecizaj signifoj, inter diversaj lingvouzantoj, kreas miskomprenojn unuflanke, sed aliflanke helpas la rapidan interkomunikadon. En lingvo nenio estas centprocente certa, do nur alproksimiĝo. Ju pli malsamaj la kulturoj des pli da eblecoj de miskompreno.

La riĉeco de la homara kulturo ĝenerale dependas de la riĉeco de la tuto de la malsamaj kulturoj. Estas do necesa, krei kaj reteni la plej grandan diversecon de kulturoj kaj de nocioj. Tio tamen agas kontraŭ la evitado de miskomprenoj inter la kulturoj, do inter la nocioj kaj inter la signifoj de lingvaĵoj. Kiel solvi tiun problemon, fortiĝantan pro t.n. tutglobiĝo, la pliiĝado de la internaciaj kaj interkulturaj rilatoj? Ofte veras, ke lingvo reprezentas specialan kulturon, kaj ke ŝajne ne eblas traduki precize de unu lingvo al alia. Ni tamen ne troigu la ideon, ke lingva tradukado ne tute eblas, kaj ke ni sekve ne kapablas komprenigi al alilingvano, per nia lingvo, niajn specialajn nociojn.



Ten eerste komen die verschillen van betekenis niet alleen voor tussen verschillende talen, maar ook in iedere taal zelf, omdat cultuur niet eenvormig is en omdat ieder mens afzonderlijk zijn eigen cultuur heeft en dus een enigszins ongelijke betekenis geeft aan de woorden. Ten tweede vinden wij zeer ongelijke culturen in één en dezelfde taal, bv. de Duitse en de Oostenrijkse. Ten derde is de taal heel goed in staat om de begrippen van een andere taal uit te drukken, al is het met meer woorden. Daarom is het probleem "taal = cultuur" van weinig belang.

Toch wensen wij, in de betrekkingen tussen volkeren en tussen culturen, zo precies mogelijk te zijn, voornamelijk omdat vaag taalgebruik ernstige gevolgen kan hebben. We hebben dus iets anders nodig dan een eenvoudige taal-naar-taal-vertaling. We hebben een tussenmiddel nodig, dat de eenvoudige vertaling accurater maakt. Hoewel de doeltaal in staat zou zijn om, met veel meer woorden en uitleggingen, de begrippen van de oorspronkelijke taal precies voor zijn cultuur weer te geven, is er iets dat het veel praktischer en veel korter kan doen: een kunstmatige taal die zó gemaakt is, dat hij de begrippen van de brontaal precies invult en die precies uitdrukt om door de spreker van de doeltaal begrepen te worden. Omdat zijn woordopbouw levend en bewust is, kan Esperanto deze functie vervullen, **maar alleen als het zelf geen speciale cultuur heeft en als de betekenissen van de woorden ervan ruim zijn en, door een beperkend gebruik van meer bijvoegelijke naamwoorden en andere bijvoegsels, aan andere talen aangepast kunnen worden.** Teneinde allerlei culturen, en dus ook allerlei begrippen en betekenissen, in woorden te kunnen uitdrukken, moet Esperanto zelf cultuurloos zijn, en moeten de woorden ervan meer kunnen vertegenwoordigen dan de betekenissen van één cultuur of van één groep.

Hieruit volgt, dat wij ernaar moeten streven om een cultuurloos Esperanto te behouden, dat in staat is alle culturen uit te drukken en zodoende functioneert als het meest objectieve en meest betrouwbare communicatiemiddel tussen verschillende talen en culturen. Als wij dit niet doen, zal de mensheid in een eeuwige staat van misverstand blijven, of er blijft maar één taal en één cultuur over, hetgeen strijdig is met de vooruitgang van de mensheid naar een meer ideale trap van samenleven.

#### Adreso de la aŭtoro

Marcel LEEREVELD

12, Heather Grove

Belgrave South, Victoria-3160

AŬSTRALIO

Unue tiuj signifodiferencoj aplikiĝas ne nur al malsamaj lingvoj, sed ankaŭ al ĉiu individua lingvo, ĉar la kulturo ne estas unuforma kaj ĉiu individuo havas sian propran kulturon kaj do donas iomete malsamajn signifojn al la lingvaĵoj. Due ni konstatas tre malsamajn kulturojn en sama lingvo, ekz. la germanan kaj la aŭstran. Trie la lingvo tre kapablas uzati por komprenigi aliiĝe nociojn, se per pli da vortoj. Do la problemo "lingvo = kulturo" estas malpli grava ol oni kutime opinias.

Ni tamen, en niaj interpopolaj kaj interkulturaj rilatoj, deziras esti tiom precizaj kiom eblas, precipe ĉar seriozaj konsekvencoj povas kreiĝi pro nepreciza interkomunikado. Ni do bezonas ion alian ol simplan lingvo-al-lingvo-tradukadon. Ni bezonas interkomunikilon, kiu pliprecizigas la simplan tradukadon. Kvankam la celita lingvo povus, per multe pli da vortoj kaj da klarigoj, sufiĉe precize bildigi por sia kulturo la nociojn de la fonta lingvo, ilo por tion fari multe pli praktike, ĉar pli mallonge, estas lingvo arte farita tiel, ke ĝi sorbas ĝustamaniere la nociojn de la fonta lingvo kaj kapablas ĝustamaniere esprimi ilin por esti komprenata de la parolantoj de la celita lingvo. Ĉar ĝia vortkonstruo estas vivanta kaj konscia, Esperanto kapablas plenumi tiun funkcion, **sed nur se ĝi ne mem havas specialan kulturon kaj se la signifoj de ĝiaj vortoj estas vastaj kaj al la etnaj lingvoj adapteblaj per la limiga uzo de pli da epitetoj kaj suplementoj.** Por povi esprimi ĉiajn kulturojn, do ĉiajn nociojn kaj ĉiajn signifojn, Esperanto mem devas esti sen kulturo kaj ĝiaj vortoj ne povu reprezenti nur la signifojn de unu aŭ de grupo da etnaj kulturoj.

Konsekvence, ni devas strebi al reteno de senkultura Esperanto kapablanta esprimi ĉiujn kulturojn kaj tiel aganta kiel la plej objektiva kaj plej fidebla interkomunikilo kaj interlingvo inter malsamaj lingvoj kaj kulturoj. Se la homaro ne faros tion, ĝi restos en eterna stato de miskomprenado, aŭ disvolviĝos al unulingva unukultureco, ambaŭ kontraŭaj al progreso de la homaro al pli ideala ŝtupo de kunvivado.

#### Priaŭtora informo

La aŭtoro specialiĝis pri lingvismo en Nederlando kaj post 1952 en Aŭstralio. Kvankam esperantisto jam ekde 1933, li nur dum la lastaj dudek jaroj koncentriĝis al la lingvisma perfekteco de Esperanto, speciale por zorgi ke la lingvo ne aliflankiĝu for de sia origina logikeco. Li estas la ĉefekzamenisto por Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj verkis plurajn studlibrojn.